# avanco

1/05

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



# Estrara raporto pri la agado de Kuba Esperanto-Asocio en 2004

**Enkonduko**

Estrara Raporto estas iom vasta enrigardo kaj – samtempe – resumo de la laboro de la Asocio dum la jaro, de la vidpunkto ĉefe de estraranoj, kiuj raportas ĉu abunde ĉu malabunde, kun forgesoj aŭ sen forgesoj, kaj ni bezonas tempon por la fizika laboro sed ankaŭ mensan energion por enmeti laborrezultojn, forgesitaĵojn kaj, eĉ pli malfacile, ellasi informojn kaj observojn ofte atentindajn, sed tro ampleksajn por la jara raporto. Vi do ricevas ĉi tie nur palan bildon de la laboro de via Asocio tra la tuta lando.

Kvankam nia atento restas ĉefe sur la jaro 2004, ni ankaŭ konscias, ke tiu ĉi estos la lasta raporto de la nuna estraro, ĉar okazos elektoj de nova estraro por la periodo 2005-2007. Pro tio, ni ankaŭ ĵetis atenton al tio, kion ni raportis en antaŭaj jaroj, kaj donas etan superrigardon de la taskoj farendaj dum la venontaj semajnoj, tio estas la 5-a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio. La laboro prezentata en tiu ĉi raporto de la estraro estas kompreneble rigardebla tra la prismo de la ĉefaj taskoj.

La jaro 2004, kies laborrezultojn ni prianalizos kaj raportos ĉi tie, estas signita de multaj malfacilaĵoj kaj defioj, revoj kaj realoj, fortoj kaj malfortoj. Denove pluraj taskoj staras antaŭ ni kaj novaj defioj.

Ni ne povas forgesi ke nia KEA naskiĝis depost multa sindediĉo kaj tenaceco de niaj antaŭuloj; ili instruis la lingvon al ni, kaj ankaŭ donis al ni la semon de io interna nutranta la movadon, iom da idealismo kaj inspiro. Tamen, dum la lasta periodo, diversaj projektoj restis ne plenumitaj survoje, ofte pro manko de homfortoj, kiu estas la plej valora kaj malfacile trovebla trezoro. Nuntempe, tiu daŭre estas nia ĉefa problemo, homfortoj por entrepreni plurajn taskojn farendajn.

Aliflanke ni kontentas ke malgraŭ ĉio, gravaj taskoj estis plenumitaj, ni sukcesis stabiligi – eĉ se ankoraŭ plibonigenda – la administradon de niaj financoj kaj membraro, la rilatojn kun la Ministerio pri Kulturo (MINCUL); ni ne ĉesis okazigi eventojn regionajn kaj lokajn, partopreni librofoirojn lande kaj eksterlande, aktive partopreni UK-ojn kaj ILEI-konferencojn, eniri la interretan mondon kaj sukcese okazigi tutamerikan kongreson, kiu altigis nian prestiĝon antaŭ la landaj instancoj kaj la internacia E-movado.

La praktiko montras al ni, ke potencialo ekzistas, ke interkompreniĝo nepras por efika kaj unueciga laboro, ke ĉiu homo estas valora kun propraj virtoj kaj malvirtoj. Ĉiuj taskoj estas gravaj kaj postulas nian dediĉon, paciencon kaj energiojn. Kun tia spirito ni laboru hodiaŭ!

Maritza Gutiérrez González
Prezidantino

**1. Alberto Fdez-Calienes Barrios (Informado kaj eldona agado)**

**Hispanlingva informado pri Esperanto:** Post la eldono de la informilo nenio alia estis entreprenita. Dum la 6-a TAKE estis intervjuita kune kun aliaj gekolegoj por radioprogramo kaj gazetartikoloj. Mario Ruiz Karell kaj Alejandro García, aktivuloj pri informado, diskonigis informojn pri kursoj kaj aranĝoj de la Asocio.

**E-lingva informado pri Kubo kaj la kuba E-movado:** Norberto Díaz Guevara administras retpaĝaron kiu publikigas la plej

freŝajn novaĵojn pri la kuba movado: (www.esiss.co.cu/esperanto/jajabokubo.htm). La paĝaro de Radio Havano Kubo ankaŭ publikigas informojn pri Kubo.

**Seminarioj pri informado**: Okazis kelkaj dum la jaro. Ĉefe organizitaj de Juan Ramón Rodríguez Gómez. Kunorganizis kaj partoprenis seminarion en Havano.

**Eldono de *Avanco*:** La redakta teamo ne sukcesas aperigi la revueton laŭplane. Aperis n-roj 1 kaj 2-4/2003. Baldaŭ aperos n-ro 1/2004, kiu fakte estas reprodukto de la Estrara Raporto 2003. Speciala n-ro 2-4/2004 kun raportoj pri la 6-a TAKE ankoraŭ estas ĉe la redaktoro.

**Aliaj eldonoj:** Ne estas.

**Biblioteko:** Nenio nova. Post la dungo de oficisto la biblioteko devos esti je dispono de la interesitoj, sub kontrolo kaj administrado de la Centra Oficejo. Por la ekfunkciigo mankas transdoni al la Libroservo duoblaĵojn kaj brokantaĵojn.

**Filio Guantánamo:** Ne vizitis la filion dum 2004. Tamen aliaj estraranoj ja vizitis pro aliaj kialoj kaj tiel restis informita.

**Filio Cienfuegos:** Interŝanĝis ideojn kun Norberto Díaz Guevara kaj Bárbara Borrell. La unua komencis instrui tie kaj raportis al la NE, kiu financis liajn vojaĝojn. Pri la evoluo de la situacio tie, la NE rekonsideras la strategion.

**Vortaro Hispana-Esperanto/Esperanto-Hispana:** Laboras de pluraj jaroj en la kompilado de tiu dudirekta vortaro.

**Tradukoj de kuba literaturo:** Laboras de pluraj jaroj en la traduko de verkoj de Alejo Carpentier.

**2. Maritza Gutiérrez González (Prezidantino)**

**Publikaj rilatoj**: Dum la jaro la asocio daŭre flegis siajn rilatojn kun diversaj institucioj. La rilatoj kun MINCUL regule okazis kun la fako NRO-j, specife pri kulturaj programoj por pritrakti la okazigon de TAKE kaj la planon de eventoj 2005 kaj aliajn gravajn aspektojn koncerne la vivon de la asocio; en februaro okazis planita kontrolvizito de MINCUL, sekvis kunsidoj ĉe MINCUL kaj Kuba Libroinstituto, kiu iniciatis proceson de kontrolo kaj informpetoj rilate la staton de la asocio kaj laborplanoj. En julio okazis la jara kunsido ĉe MINCUL pri la stato de la laborrilatoj, ili informis pri nova etapo por la Neregistaraj Organizaĵoj (NRO-j).

En la kunsido kun NRO-j ni partoprenis la analizon pri la rolo de niaj organizaĵoj en la nuna internacia konjunkturo kaj partoprenis du kunsidon kunvokitan de la Centra Komitato de Kuba Komunisma Partio pri la strategio sekvenda de NRO-j rilate la usonan blokadon. Ni partoprenis la forumon de la Civila Socio kunvokitan de Kuba Asocio de Unuiĝintaj Nacioj (ACNU) kaj de la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj pri la sinteno de la kubaj NRO-j rilate la usonan blokadon altrudatan al la insulo.

Ni konsideras, ke dum la jaro niaj rilatoj kun MINCUL travivis pli bonajn momentojn kiel rezulto de nia stabila laboro kaj la sukcesa okazigo de TAKE, kvankam bedaŭrinde multaj burokrataĵoj postulas pli kaj pli da tempo kaj energio dum kelkaj restaj pendantaj. Tamen, la rilatoj evoluas je pli bona nivelo ol antaŭe.

Dum tiu ĉi jaro niaj kontaktoj kun Kuba Instituto de Amikeco kun la Popoloj (ICAP) restis stabilaj danke al la plua efektiviĝo de la solidara agado de la Amikoj de Kubo en Belgio, kies piliero estas s-ro Eddy Raats. Ili daŭre sendas sian kontribuon ĉefe per libroj kaj aliaj materialoj transdonitaj al la filioj kaj al aliaj kubaj institucioj dum la jaro.

**Internaciaj rilatoj**: Dum la jaro ni daŭre flegis niajn rilatojn kun UEA per partopreno en la Interretaj diskutlistoj Landa Agado, Komitato, Amerika agado kaj Radioj en Esperanto; same per la retpaĝaro administrata

de Norberto Díaz Guevara en Sancti Spíritus kaj eĉ diskonigante novan diskutliston [esperantocuba@yahoogroups.com] kreitan de Jorge Luis González Santillán en Camagüey, kiun partoprenas ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Per tiuj listoj internaciaj, regule ni informas pri niaj aranĝoj enlande, kiel la datreveno de KEA, la Tutamerika Kongreso, la evento en Guantánamo kaj aliaj. La plej pinta momento por tio estis la partopreno en la Komitatkunsido de UEA kaj specife en la subkomitatoj pri Financo kaj Landa Agado kadre de la 89-a UK en Pekino, Ĉina Popola Respubliko kaj la 33-a ILEI-Konferenco en Bratislavo, Slovakio. Pri nia agado tie la komitatanoj ricevis koncernan raporton. Indas mencii ke ĉi-jare en la Estraro de UEA por la unua fojo estis elektita kuba esperantisto.

**6a TAKE**: En marto 2004 sukcese okazis en Havano la 6-a Tutamerika Kongreso. Partoprenis ĝin pli ol 160 geesperantistoj el 12 landoj kaj Vicministro pri Kulturo Ismael González partoprenis la inaŭguran tagon. Nuntempe, informoj kaj fotoj troveblas en la retpaĝo de Amerika Agado kaj en la paĝo de Sancti Spíritus. Kadre de TAKE okazis prelegoj, rondaj tabloj, kursoj, sesio de Internacia ILEI-ekzameno, riĉa kultura kaj kleriga programo, turisma programo kaj vera internacia etoso regis dum tuta semajno. La havanaj esperantistoj bonvenigis samlandanojn tute malferme en propraj domoj, ĵurnalistoj raportis, Ĉina Radio Internacia sendis du raportistojn por la okazo, kio estas eksterordinara okazintaĵo. Ni povas taksi la 6-an TAKE en Kubo kiel sukcesa kaj prestiĝiga evento por la kuba E-movado.

### 3. Julián Hernández Angulo (Kulturo kaj disvastigo)

Dum la jaro 2004, ni starigis kontaktojn kum artistoj en- kaj eksterasociaj por garantii la kulturan programon de la 6-a Tutamerika Kongreso. Ni petis al la prezidantoj de filioj alvoki asocianojn por pretigi kulturajn programojn, ĉefe por la Intenacia Arta Vespero. Pluraj amatoraj artistoj de la asocio respondis al la alvoko tre serioze kaj danke al ilia klopodo kaj laboro tia vespero estis tre sukcesa. La filioj en Urbo Havano, Sancti Spíritus, Granma kaj Camagüey aktive partoprenis. Indas elstarigi la laboron de Yoandra Rodríguez, Mario Ruiz kaj la aktorino Georgina Almanza kiuj partoprenis en la arta programo de la inaŭguro kaj fermo de la Kongreso.

La provinca artlernejo Paulita Concepción regalis nin per belaj artaj prezentoj dum la inaŭguro kaj fermo de la Kongreso danke al la laboro de Mayra Núñez, kiu kontaktis la estrojn de la lernejo kaj gvidis la diversajn provludojn.

Danke al la tradiciaj rilatoj kun la Kulturdomo en municipo La Habana Vieja, ĝiaj artistoj garantiis la artan programon de la Nacia Vespero. Dancensemblo de la kulturdomo en municipo Diez de Octubre ankaŭ partoprenis la Nacian Vesperon danke al la kunlaboro de Albania Duthil.

En- kaj eksterasociaj artistoj prezentis siajn programojn dum vespera festo organizita de la municipa filio Centra Havano.

Dum la Centra Aranĝo omaĝe al la 25-a datreveno de KEA, ni transdonis atestojn al ĉiuj artistoj partoprenintaj la Kongreson.

Dum la tuta jaro, en- kaj eksterasociaj artistoj partoprenis en niaj aranĝoj kaj en tiuj de kelkaj komunumoj. Menciindas la laboro de Isnel Pupo en Holguín kaj la Kultura Rondo ĉe Miriam Casals kiu komenciĝis en la dua semestro kaj okazas nun ĉiun trian dimanĉon.

Ni daŭre stimulis filiojn okazigi lokajn kaj regionajn renkontiĝojn. Elstaris la lokaj aranĝoj de MG Cascorro en Camagüey.

Dum la periodo, ni eldonis la *Kulturilon* n-ro 3, tradukis poemojn kaj kantojn por ar-

tistoj kaj sendis kontribuaĵojn al la esperantistoj de Avilés, en Hispanio.

En ĉiuj asociaj aranĝoj, kiujn ni partoprenis, ni prezentis artan programeron kaj klopodis per parolado, legado de artikoloj kaj poemoj plialtigi la esperantistan kaj kulturan nivelon de la asocianoj.

Dum la lastaj kvar monatoj de la jaro, ĉiumarde vespere ni aranĝis videofilman lecionon de la kurso "Pasporto al la Tuta Mondo" kun la aktiva kunlaboro de Albania Duthil en la Nacia Sidejo.


Ni planis partopreni la 6-an Infanfestivalon en Guantánamo, sed ĝi, pro diversaj kialoj, ne okazis.

**Disvastigo:** Malgraŭ pluraj klopodoj aktivigi la movadon en Pinar del Río, La Habana, Villa Clara, Cienfuegos, Matanzas, Junulara Insulo kaj Las Tunas la rezulto de tiu agado estis magra.

En Cienfuegos estas grupeto kiu reorganiziĝis kaj entreprenis kelkajn taskojn cele al disvastigo. Norberto Díaz Guevara vizitis la provincon kaj instruis kun financa helpo de la NE. Bárbara Borrell partoprenis la 6-an Tutamerikan Kongreson.

Esperantisto el Villa Clara kontaktis la Nacian Sidejon kaj promesis eklabori por revivigi la movadon tie. Ni sendis kelkajn materialojn al li kaj al aliaj interesitoj en la provinco.

Esperantisto el municipo Pedro Betancourt, Matanzas ne sukcesis reorganizi la laboron. Laŭ la lastaj novaĵoj ili elektis no-



*La novelektita estraro de KEA por la periodo 2005-2007. De maldekstre: Albania Duthil Álvarez (Kulturo kaj Disvastigo), Juan Ramón Rodríguez Gómez (Informado kaj Eksteraj Rilatoj), Alberto Fernández-Calienes Barrios (Ĝenerala Sekretario), Alberto García Fumero (Faka Agado kaj Utiligo), Marta Alonso Gutiérrez (Instruado kaj ILEI-Sekcio), Maritza Gutiérrez González (Financo) kaj Julián Hernández Angulo (Prezidanto).* Foto: Norberto Díaz Guevara.

van prezidantinon. Indas mencii la unuopan laboron de José de Jesús Campos kiu instruas al infanoj kaj sendas kontribuaĵojn al la revuo *Juna Amiko*. Raúl Rodríguez partoprenis la 6-an Tutamerikan Kongreson.

Nenia respondo aŭ reago venis el Pinar del Río, La Habana, Junulara Insulo kaj Las Tunas post niaj alvokoj daŭraj.

Dum 2004 la movado en Camagüey etendiĝis al municipo Florida kie nun estas grupo de interesitoj. La grupo en Cascorro pli stabiliĝis.

La esperantistoj de Urbo Havano ne sukcesis kreskigi la membraron pro diversaj kialoj, ĉefe organizaj.

La movado en Sancti Spíritus kaj Ciego de Ávila restis same kiel dum 2003. La tieaj esperantistoj malgraŭ klopodoj ne sukcesis plialtigi la membraron.

Guantánamo kaj Holguín kreskis je 48 kaj 30 membroj respektive. Indas mencii la aktivan agadon de la esperantistaro en Guantánamo. Ili sukcese organizis Tutlandan Metiejon dum la Zamenhof-tago.

La esperantistoj de Santiago de Cuba kreskis je 105. Organizaj aferoj malhelpis atingi pli kontentigan rezulton laŭ la provinca potencialo; oni devis fermi la municipan filion ĉefe pro organizaj kialoj.

Indas elstarigi la agadon de la esperantistoj de Granma kiuj daŭre plialtigas sian membraron kiel rezulto de bona kaj serioza organiza laboro. Ĉe ili la koresponda kurso montriĝas tre fruktodona grundo por la kreskigo de nia movado.

Dum la periodo, Albania Duthil, nacia komisiito pri Disvastigo starigis plurajn kontaktojn kun aliprovincaj esperantistoj cele al plia etendiĝo de la movado.

**4. Alberto García Fumero**
**(Apliko de Esperanto)**

Dum la jaro 2004 mia laboro kiel estrarano pri Apliko de Esperanto centriĝis en tri aferoj: kunpreparado de la 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto, ĉefdelegita laboro kaj ĉefredaktoreco de *Avanco*.

***Avanco.*** Tiu ĉi lasta krizas delonge kaj eble la plej bona estos, ke mi ne plu konsistigu balaston. Problemoj rilataj al manko de sufiĉa komunikado kaj kunordigo, kaj ĉefe manko de konscio pri ĝiaj signifo kaj rolo en nia movado nacia, igas nian bultenon bedaŭrinde lama. Krome, mia profesia laboro multe pezas, kaj terure mankas al mi tempo.

Ekzistas teamo nur surpapera, malgraŭ ĉiuj deklaroj pri kunlaboro; la redaktado de preskaŭ ĉio delonge falas sur la ŝultrojn de la ĉefredaktoro. Mi kuraĝas sugesti, ke de nun ĉefredaktoreco de *Avanco* estu aparta tasko kaj ke oni finfine pretigu kondiĉojn por la laboro tiucela en la sidejo. Nuntempe tio preskaŭ ne eblas. Ankaŭ: eble Apliko kaj Informado devus konsistigi unusolan fakon. Tio helpus glatigi aferojn, kaj ne okazus kolizioj inter ambaŭ fakoj.

**TAKE:** La laboroj super la kleriga programo kiun ni ĝuis dum la 6-a TAKE komenciĝis jam pasintjare kaj postulis longajn sed ege fruktodonajn debatojn. Dum TAKE mi prelegis pri difinita temo, partoprenis forumon kaj gvidis plian. Poste mi ankaŭ informis pri TAKE al Ĉina Radio Internacia kaj al la revuo *Esperanto* per artikolo. Nuntempe mi laboras super la kleriga programo de la venontjara 5-a Kongreso de KEA, kaj mi profitas la okazon atentigi pri tio, ke ankoraŭ mankas difinoj kaj multe da surtabla laboro pri tiu programo, ne nur de la estrarano pri kulturo kaj mi, sed ankaŭ de la tuta estraro.

**Ĉefdelegito:** La laboro kiel ĉefdelegito estas aparta ĉapitro. Finfine ni havas ĝisdatajn informojn pri kiom da Individuaj Membroj (IM) de UEA ekzistas en Kubo, kaj iom post iom oni sukcesis remembrigi aktivajn esperantistojn kiuj pro diversaj kialoj malaperis el la listo pagita pere de Fondaĵo Canu-

to en UEA, kiel ekzemple Julián Hernández kaj Yoandra Rodríguez. Celo estis ankaŭ la fakdelegiteco de kubaj IM, kaj nuntempe ili nombras 17, pli ol iam antaŭe.

**5. Marta Alonso Gutiérrez (Financo)**

**Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj:** La administraj taskoj plenumitaj dum la jaro koncentriĝis pri la plua funkciado, riparado kaj aliaj laboroj de la Nacia Sidejo de KEA, kiu, dum la jaro, plenumis diversajn servojn al interesitoj, vizitantoj, en- kaj eksterlandaj esperantistoj. Oni devas ankoraŭ strebi por plibonigi la servojn kaj la fluon de informoj en la CO. Ekde julio Alberto Rodríguez Pineda laboras oficiale kiel direktoro de la sidejo.

**Kontroli la plenumom de la buĝetoj de KEA en CUP kaj CUC:** La 6-a Tutamerika Kongreso de Esperanto ne havis librotenajn problemojn: Oni malfermis apartajn kontojn por CUP ĉe BANDEC (Filio Stratoj 23 kaj P)kaj CUC ĉe BFI (Filio Hotelo Habana Libre). Post la fino de TAKE la saldo estis transigita al la konto de KEA. La kongreso finiĝis kun favora saldo de CUC 3591.16 kaj CUP 15 406.96, tiel oni povas vidi la verajn kongresajn enspezojn. Dum la jaro, oni sukcesis garantii la esencajn servojn kaj eventojn planitajn.

Malgraŭ mia strebo pro kialoj kiuj ne dependis de mia volo mi ne povis liveri al Provinca Filio Holguín la monon aprobitan por la riparado kaj beligado de la infanparko "Bona Amiko", (CUC 50.00) . Tiun sumon ni transdonos al la reprezentanto de PF Holguín dum tiu ĉi Komitatkunsido. Rilate al la buĝeto, ni ne plenumis la enspezojn laŭ ĉapitroj nek en CUC nek en CUP, ankaŭ ne plenumiĝis la elspezoj; tio faras ke la saldo fine de la jaro estas favora.

Ekde tiu ĉi jaro KEA ne plu rajtas enkasigi monon pro loĝigo, nur restas, kiel oni vidas en la CUP-buĝeto: Kotizo, Libroservo, kaj Donacoj. En CUC nur Libroservo kaj Donacoj. Tiam la filioj devas strebi varbi membrojn kaj konsciigi ilin pri la bezono fariĝi membroj-subtenantoj.

**Atenti kaj kontroli la filiojn kun emfazo en la konscio pri memfinancado kaj travideblo en ĉiuj niveloj:** La filioj transpagas tra la banko, kio multe helpas la administradon. La filioj daŭre devas insisti ĉe la banko ke oni skribu la nomon de la filio sur la pagilo, aŭ sendi la numeron de la kvitanco kiun liveras la banko.

Preskaŭ ĉiuj filioj sendas la kotizkvitancaron bonorde; sed daŭre ekzistas malfacilaĵoj en PF Urbo Havano.

Ni kontrolis dufoje la financojn de MF Centra Havano, sed la problemoj ne estas solvitaj. La komitato devas analizi la diversajn kontrolojn dum la jaro al la filioj kaj preni en konsideron, ke ne eblas ke dum pli ol tri jaroj iu filio malbone funkcias sen meti limojn al tiu ĉi problemoj: tiuj malbonaj rezultoj malhelpas la tutan funkciadon de la asocio kaj metas sur KEA multajn problemojn. Dum tiu ĉi jaro mi inspektis la provincojn Guantanamo, Santiago de Cuba, Holguín kaj Granma. Ili ĉiuj havis bonajn kontrolojn kaj rezultojn, aperis nur kelkaj problemetoj analizitaj kun ili dum la inspektado sed, ĝenerale la rezultoj estis tre bonaj. Mi gratulas ilin kaj petas al la prezidantoj de filioj ĉi tie, ke dum la venonta aranĝo en siaj provincoj ili informu tion al la esperantistoj kaj stimulu la estraranon pri financo. La rezulto de la kontrolo al MF Centra Havano estis malbona, al Urbo Habano nebona. Dum reinspektado ili ankoraŭ prezentas problemetojn.

**Kontroli kaj prizorgi la Libroservon kaj labori por kreskigi ĝian stokon. Flegi ties efikan funkciadon:** Dum la tuta jaro, ni laboradis por pliriĉigi niajn stokojn en la Libroservo per diversaj materialoj, kasedoj, kompaktdiskoj, bildkartoj, telefonkartoj. La

nova oferto de Libroservo al la filioj kaj esperantistoj ne havis la rezulton kiun mi pensis kvankam kelkaj filioj mendis librojn. Libroservo helpis en la donaco farita de Pedro Fernández, estrarano pri edukado al la E-instruistoj tra la lando. Libroservo ankaŭ helpis al la biblioteko de la grupo en municipo Diez de Octubre por havigi stokon da materialoj al la tieaj esperantistoj. Oni disdonos liston de la materialoj haveblaj de la Libroservo.

**Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono:** Membris en la Komisiono Mario Ruiz Karell, Jorge L. González Santillán kaj Rafael Cabrera Espinosa; oni sukcesis kunsidigi ilin fine de oktobro, kiam oni faris la koncernan financan reviziadon nacinivele kun tre bonaj rezultoj. Laŭ la nova konsisto de la komitato devas esti elektita aŭ kompletigita laŭ la kazo por tiu ĉi nova periodo la Financa Komisiono de la Komitato.

**Kontrakti la servojn de CANEC**. Oni kontraktis tiujn servojn por la reviziado de nia librotenado dum 2004. La laboro estis farita en marto. La rezulton mi legos nun. Ni ankaŭ ricevis viziton de la estro de la Direkcio pri Ekonomio de MINCUL, kiu mallonge reviziis la financojn kaj esprimis sian kontenton pri la rezultoj. Mi pensas ke por la sano de la librotenado de KEA oni devas daŭre kontrakti revizoradon de CANEC.

Dum tiu ĉi jaro la plej bona rezulto en financo estas laŭvice: unua loko PF Granma kiu raportis membraron de 120 membroj akurate. Poste PF Camagüey 53, MG Guantánamo 48, PF Holguín 30, kaj MG Ciego de Ávila 10, PF Sancti Spíritus 5, ankaŭ laŭ la dato fiksita de la komitato. PF Santiago de Cuba, parto laŭdate kaj parto ne, kun 105 membroj. PF Urbo Havano raportis ekster la limdato interkonsentita de la komitato 84 membrojn. La mono, kotizkvitancoj kaj membrokontrolo de la esperantistoj de MF Centra Havano, ne iris en la jaro 2004 al la konto de PF Urbo Havano, pro tio la esperantistoj de tiu filio, ne aperas kiel membroj de la Asocio. Mi gratulas la filiojn, speciale kasistojn, prezidantojn, kaj ĝeneralajn sekretariojn pro la bona rezulto kaj la teama laboro.

### 6. Pedro Fernández Rodríguez (Instruado)

Dum la jaro 2004 naciskale la rezulto de tiu ĉi fako ne estis bona, tamen oni daŭrigis instruante en preskaŭ ĉiuj provincoj kie estas movado kaj diplomigis multajn gelernantojn.

Dum la 6-a TAKE ni faris la ILEI-UEA-ekzamenon, kun granda sukceso. En la Baza Nivelo estis 5 kandidatoj, el ili 4 kubanoj kaj unu eksterlandano, sukcesis 1 kubano kaj 1 eksterlandano, tri kubanoj abandonis. En la Meza Nivelo estis 5 kandidatoj, 4 kubanoj kaj 1 eksterlandano, ĉiuj 5 sukcesis kun ege bona rezulto.

**Koresponda Kurso**: El la tuta lando ni devas mencii la laboron de PF Granma, kiu estas la provinco kun plej multaj partoprenantoj en la Koresponda Kurso kaj havis bonan rezulton. Ni devas elstarigi la tre bonan laboron faritan de komisiito Liudmila Kashtánova. Telefone, letere kaj kelkfoje persone, ŝi atentis la gelernantojn de la Koresponda Kurso.

### 7. Juan Ramón Rodríguez Gómez (Ĝenerala Sekretario)

En 2004, mia laboro ne estis tiel funda kiel en antaŭaj jaroj ĉar mankis la stabileco kaj sindediĉo bezonataj por entrepreni tiel ampleksan laboron. Veraj rezultoj el tio estas la fakto ke malfrue mi aranĝis kaj disdonis la protokolojn de la Estraro.

**Membro-kontrolo kaj kotizo unufoje jare:** Alifoje, mi estis devigata multege labori, dum la lastaj du monatoj, por havigi al

ni ĉiuj la tutlandan membrokontrolon, ĉefe pro la fakto ke temas pri tasko kiu dependas de tio kion oni faras en la filioj kaj, en 2004, la plej granda parto de la informoj (i.a. membrokontrolo, kotizkvitancoj...) alvenis ĉe ni dum novembro, decembro kaj eĉ januaro. Vi ĉiuj scias ke, laŭ decido de la 20-a Komitatkunsido, ni planis mezuri la statistikajn rezultojn de la tutlanda laboro post la fino de oktobro. Tamen, por tion aranĝi ĝustatempe malhelpis malfruiĝo de la senditaj informoj (ankaŭ kun malkongruoj aŭ mankoj de kelkaj bezonataj aferoj). Ni esperis ke ĉiuj enspezu jaran kotizon, kio sendube faciligus la laboron je ĉiu instanco, sed tio okazis nebone, ĉar kelkaj filioj aranĝis ĝin semestre, kiel tradicie, kio tro komplikigas la aferon. Rezulto de tio estas la ekzisto de membroj kiuj nur pagis la unuan aŭ duan semestron (ekz. PF Santiago de Cuba kaj PF Urbo Havano). Grava afero estas ke, kompare kun 2003, la membronombro malkreskis naciskale:

**MEMBRONOMBRO 2004**

| | |
|---|---|
| Guantánamo | 48 |
| Santiago de Cuba | 105 |
| Granma | 119 |
| Holguín | 30 |
| Camagüey | 53 |
| Ciego de Ávila | 10 |
| Sancti Spíritus | 5 |
| Ciudad de La Habana | 84 |
| PKK (NE) | 10 |
| **Totalo** | **464** |

**Atento kaj kontrolvizitoj al filioj:** Ĉi tie, mi nur ripetas kion mi informis dum la pasinta Komitatkunsido, ĉar tute samas: "Malkontentigas nin la fakto ke, dum la periodo, pro diversaj kialoj, ne eblis al tutlandaj estraranoj viziti la filiojn tiel ofte kiel tradicie. Tio meritas revigligon ĉar, pere de tiuj vizitoj, la estraranoj havas la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan de la surlokaj esperantistoj." Krom al Urbo Havano, ni faris 11 vizitojn al 5 filioj (Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Holguín kaj Ciego de Ávila), sed preskaŭ ili ĉiuj okazis en rekta rilato kun eventoj (renkontiĝoj, seminarioj, kunsidoj...). Do, ne estis veraj kontrolvizitoj (nur Marta faris tion: en orientaj provincoj kaj la ĉefurbo).

**Sendado de KEA-informiloj al M-S:** Tradicie, mi sendas al Membroj Subtenantoj ekzempleron de *Avanco,* sed ĝia apero fiaskis dum la periodo, kaj nur eblis aperigi ĝin fine de la jaro. Tio vere malhelpis la agadon de la Asocio. Kompreneble, ankaŭ en la filioj oni devas plu stimuli kaj atenti la lokajn membroj-subtenantojn.

**Flegi la informan fluon al la Komitato. Partoprenigi komitatanojn en la ordinaraj estrarkunsidoj:** Rilate la atenton al komitatanoj, ni kelkfoje kontaktis ilin telefone, persone aŭ perpoŝte; kaj, samtempe, la NE ĉiam sendis al ili la monatajn protokolojn. Tamen, ĝi estas plibonigenda tasko. Krom Cirilo Ramos Piñeiro, prezidanto de PF en Urbo Havano, neniu komitatano el filioj partoprenis ordinarajn estrarkunsidojn kaj neniu informis al ni intereson pri tio.

**Amerika agado:** Dum 2004, ni daŭrigis regulajn rilatojn kun diversaj landaj, regionaj kaj lokaj asocioj per diversaj rimedoj, ĉefe en rilato kun la 6-a TAKE, kies rezultojn vi bone konas. Bedaŭrinde, nur eblis sendi al ili la asocian organon (kiel jam kutime ni faris), fine de la jaro.

**Historio:** Kiel delonge okazas, la Komisiono pri Historio intense agadis la pasintan jaron je diversaj branĉoj (ĉefe en la unua trimestro) kun la dokumentaro ekzistanta ĉe ni. La laboro de la komisionanoj permesis klasifiki kaj kontroli la plejmulton el ĉio, kion iom post iom oni enkomputiligas. Dank' al tio, eblis pretigi resumon pri nia historio kaj

nova oferto de Libroservo al la filioj kaj esperantistoj ne havis la rezulton kiun mi pensis kvankam kelkaj filioj mendis librojn. Libroservo helpis en la donaco farita de Pedro Fernández, estrarano pri edukado al la E-instruistoj tra la lando. Libroservo ankaŭ helpis al la biblioteko de la grupo en municipo Diez de Octubre por havigi stokon da materialoj al la tieaj esperantistoj. Oni disdonos liston de la materialoj haveblaj de la Libroservo.

**Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono:** Membris en la Komisiono Mario Ruiz Kareli, Jorge L. González Santillán kaj Rafael Cabrera Espinosa; oni sukcesis kunsidigi ilin fine de oktobro, kiam oni faris la koncernan financan reviziadon nacinivele kun tre bonaj rezultoj. Laŭ la nova konsisto de la komitato devas esti elektita aŭ kompletigita laŭ la kazo por tiu ĉi nova periodo la Financa Komisiono de la Komitato.

**Kontrakti la servojn de CANEC**. Oni kontraktis tiujn servojn por la reviziado de nia librotenado dum 2004. La laboro estis farita en marto. La rezulton mi legos nun. Ni ankaŭ ricevis viziton de la estro de la Direkcio pri Ekonomio de MINCUL, kiu mallonge reviziis la financojn kaj esprimis sian kontenton pri la rezultoj. Mi pensas ke por la sano de la librotenado de KEA oni devas daŭre kontrakti revizoradon de CANEC.

Dum tiu ĉi jaro la plej bona rezulto en financo estas laŭvice: unua loko PF Granma kiu raportis membraron de 120 membroj akurate. Poste PF Camagüey 53, MG Guantánamo 48, PF Holguín 30, kaj MG Ciego de Ávila 10, PF Sancti Spíritus 5, ankaŭ laŭ la dato fiksita de la komitato. PF Santiago de Cuba, parto laŭdate kaj parto ne, kun 105 membroj. PF Urbo Havano raportis ekster la limdato interkonsentita de la komitato 84 membrojn. La mono, kotizkvitancoj kaj membrokontrolo de la esperantistoj de MF Centra Havano, ne iris en la jaro 2004 al la konto de PF Urbo Havano, pro tio la esperantistoj de tiu filio, ne aperas kiel membroj de la Asocio. Mi gratulas la filiojn, speciale kasistojn, prezidantojn, kaj ĝeneralajn sekretariojn pro la bona rezulto kaj la teama laboro.

**6. Pedro Fernández Rodríguez (Instruado)**

Dum la jaro 2004 naciskale la rezulto de tiu ĉi fako ne estis bona, tamen oni daŭrigis instruante en preskaŭ ĉiuj provincoj kie estas movado kaj diplomigis multajn gelernantojn.

Dum la 6-a TAKE ni faris la ILEI-UEA-ekzamenon, kun granda sukceso. En la Baza Nivelo estis 5 kandidatoj, el ili 4 kubanoj kaj unu eksterlandano, sukcesis 1 kubano kaj 1 eksterlandano, tri kubanoj abandonis. En la Meza Nivelo estis 5 kandidatoj, 4 kubanoj kaj 1 eksterlandano, ĉiuj 5 sukcesis kun ege bona rezulto.

**Koresponda Kurso**: El la tuta lando ni devas mencii la laboron de PF Granma, kiu estas la provinco kun plej multaj partoprenantoj en la Koresponda Kurso kaj havis bonan rezulton. Ni devas elstarigi la tre bonan laboron faritan de komisiito Liudmila Kashtánova. Telefone, letere kaj kelkfoje persone, ŝi atentis la gelernantojn de la Koresponda Kurso.

**7. Juan Ramón Rodríguez Gómez (Ĝenerala Sekretario)**

En 2004, mia laboro ne estis tiel funda kiel en antaŭaj jaroj ĉar mankis la stabileco kaj sindediĉo bezonataj por entrepreni tiel ampleksan laboron. Veraj rezultoj el tio estas la fakto ke malfrue mi aranĝis kaj disdonis la protokolojn de la Estraro.

**Membro-kontrolo kaj kotizo unufoje jare:** Alifoje, mi estis devigata multege labori, dum la lastaj du monatoj, por havigi al

ni ĉiuj la tutlandan membrokontrolon, ĉefe pro la fakto ke temas pri tasko kiu dependas de tio kion oni faras en la filioj kaj, en 2004, la plej granda parto de la informoj (i.a. membrokontrolo, kotizkvitancoj...) alvenis ĉe ni dum novembro, decembro kaj eĉ januaro. Vi ĉiuj scias ke, laŭ decido de la 20-a Komitatkunsido, ni planis mezuri la statistikajn rezultojn de la tutlanda laboro post la fino de oktobro. Tamen, por tion aranĝi ĝustatempe malhelpis malfruiĝo de la senditaj informoj (ankaŭ kun malkongruoj aŭ mankoj de kelkaj bezonataj aferoj). Ni esperis ke ĉiuj enspezu jaran kotizon, kio sendube faciligus la laboron je ĉiu instanco, sed tio okazis nebone, ĉar kelkaj filioj aranĝis ĝin semestre, kiel tradicie, kio tro komplikigas la aferon. Rezulto de tio estas la ekzisto de membroj kiuj nur pagis la unuan aŭ duan semestron (ekz. PF Santiago de Cuba kaj PF Urbo Havano). Grava afero estas ke, kompare kun 2003, la membronombro malkreskis naciskale:

**MEMBRONOMBRO 2004**

| | |
|---|---|
| Guantánamo | 48 |
| Santiago de Cuba | 105 |
| Granma | 119 |
| Holguín | 30 |
| Camagüey | 53 |
| Ciego de Ávila | 10 |
| Sancti Spíritus | 5 |
| Ciudad de La Habana | 84 |
| PKK (NE) | 10 |
| **Totalo** | **464** |

**Atento kaj kontrolvizitoj al filioj:** Ĉi tie, mi nur ripetas kion mi informis dum la pasinta Komitatkunsido, ĉar tute samas: "Malkontentigas nin la fakto ke, dum la periodo, pro diversaj kialoj, ne eblis al tutlandaj estraranoj viziti la filiojn tiel ofte kiel tradicie. Tio meritas reviglígon ĉar, pere de tiuj vizitoj, la estraranoj havas la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan de la surlokaj esperantistoj." Krom al Urbo Havano, ni faris 11 vizitojn al 5 filioj (Guantánamo, Santiago de Cuba, Granma, Holguín kaj Ciego de Ávila), sed preskaŭ ili ĉiuj okazis en rekta rilato kun eventoj (renkontiĝoj, seminarioj, kunsidoj...). Do, ne estis veraj kontrolvizitoj (nur Marta faris tion: en orientaj provincoj kaj la ĉefurbo).

**Sendado de KEA-informiloj al M-S:** Tradicie, mi sendas al Membroj Subtenantoj ekzempleron de *Avanco,* sed ĝia apero fiaskis dum la periodo, kaj nur eblis aperigi ĝin fine de la jaro. Tio vere malhelpis la agadon de la Asocio. Kompreneble, ankaŭ en la filioj oni devas plu stimuli kaj atenti la lokajn membroj-subtenantojn.

**Flegi la informan fluon al la Komitato. Partoprenigi komitatanojn en la ordinaraj estrarkunsidoj:** Rilate la atenton al komitatanoj, ni kelkfoje kontaktis ilin telefone, persone aŭ perpoŝte; kaj, samtempe, la NE ĉiam sendis al ili la monatajn protokolojn. Tamen, ĝi estas plibonigenda tasko. Krom Cirilo Ramos Piñeiro, prezidanto de PF en Urbo Havano, neniu komitatano el filioj partoprenis ordinarajn estrarkunsidojn kaj neniu informis al ni intereson pri tio.

**Amerika agado:** Dum 2004, ni daŭrigis regulajn rilatojn kun diversaj landaj, regionaj kaj lokaj asocioj per diversaj rimedoj, ĉefe en rilato kun la 6-a TAKE, kies rezultojn vi bone konas. Bedaŭrinde, nur eblis sendi al ili la asocian organon (kiel jam kutime ni faris), fine de la jaro.

**Historio:** Kiel delonge okazas, la Komisiono pri Historio intense agadis la pasintan jaron je diversaj branĉoj (ĉefe en la unua trimestro) kun la dokumentaro ekzistanta ĉe ni. La laboro de la komisionanoj permesis klasifiki kaj kontroli la plejmulton el ĉio, kion iom post iom oni enkomputiligas. Dank' al tio, eblis pretigi resumon pri nia historio kaj

aranĝi grandan ekspozicion por la 6-a Tutamerika Kongreso.

**Rilatoj kun UN-Asocio, UNESCO-Komisiono, Fondaĵo Fernando Ortiz kaj Asocio de Lingvistoj:** En 2004, mi daŭrigis rilatojn kun kelkaj el ili, sed ne tiel fortaj kiel dum antaŭaj jaroj. Ni plurfoje kontaktis kun Asocio de Lingvistoj, pere de ĝia prezidantino, kiu ankaŭ interesiĝas pri prelegoj de eksterlandaj fakuloj pri E, temo pri kiu ankaŭ interesiĝas la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko. Ni ankaŭ kontaktis plurfoje kun UN-Asocio.

En septembro, KEA ricevis inviton de la Ministerio pri Eksteraj Rilatoj, pere de UN-Asocio, por partopreni forumon de la kubaj NRO-j kontraŭ la usona blokado, kio postulis kelkajn preparkunsidojn, krom la okazigo de la forumo mem, kiu okazis la 14-an kaj 15-an de oktobro en Domo de Amerikoj. Kun Fondaĵo Fernando Ortiz ekzistas formalaj rilatoj, pro la fakto ke ni povas ion fari pri Ortiz, sed verŝajnas ke ili ne interesiĝas pri la afero; tamen, ni persistos tiucele. Kontraŭdire al tio, mi sukcesis kontakti estrojn de Sociedad Económica de Amigos del País, kaj ĝia organo *(Revista Bimestre Cubana*, kiun gvidis Ortiz dum pluraj jaroj) pretas publikigi artikolojn pri lia agado rilate al E kaj ĝenerale pri nia historio.

Rilate al la UNESKO-Komisiono, okazis neniu kontakto dum la jaro, kaj sendube ni tuj devas rekontakti ilin, pro la graveco kiun iom post iom atingas la rilatoj inter UNESCO kaj Esperanto internaciskale.

## RAPORTOJ DE FILIOJ

### MG Guantánamo

Komunikado kun la NE stabilas dank' al la retpoŝto. Oni diskonigis novaĵojn pri E ĝenerale, aliĝo al kursoj kaj renkontiĝoj pere de la provinca ĵurnalo kaj lokaj radiostacioj.

Sep el niaj membroj partoprenis la 6-an TAKE kaj kvin en kunveno de IKEK. La 10-a Zamenhofa Metiejo okazis en Baracoa de la 16-a ĝis la 19-a de decembro. Partoprenis esperantistoj el Urbo Havano, Camagüey (Florida kaj Cascorro), Granma, Santiago de Cuba (Contramaestre) kaj Guantánamo. La 4-a Nacia Infanfestivalo ne okazis pro diversaj malfacilaĵoj kaj estis prokrastita por julio 2005. La planita Seminario pri Informado ne okazis. Ni ne scias la kialojn.

La filio havas 48 membrojn. El ili 6 estas Membroj-Subtenantoj. Dum la renkontiĝo en Baracoa oni varbis interesitojn kiuj pretas lerni per la Koresponda Kurso.

La rilatoj kun MINCUL kaj la politikaj organizaĵoj daŭre kreskas. Same okazas kun la registaraj instancoj, la provinca biblioteko kaj ICAP.

Ekzistas bonaj rilatoj kun radiostacioj en Guantánamo kaj Baracoa.

Kun Komunumaj Servoj de la urba registaro ni kontaktis por revivigo de loka parko. Ekzistas kontakto kun la Provinca Direkcio de Asocioj de MINJUS.

Inter la kulturaj kaj distraj aranĝoj menciindas la dumonataj kolektivaj naskiĝfestoj. En la lernejo ni dediĉas tempon por diskonigi la internan vivon de nia movado en- kaj eksterlande. Ĉi-jare nia grupo ankaŭ metis florkronon omaĝe al la Nacia Heroo José Martí ĉe la monumento en la Centra Parko. Oni aranĝis libro-filmo-debaton en la biblioteko.

Post la 6-a TAKE vizitis nian provincon kvin eksterlandaj gastoj kiuj partoprenis kun ni diversajn aranĝojn.

### PF Santiago de Cuba

Oni regule informas pri la regula kaj koresponda kursoj pere de la provinca radiostacio CMKC kaj la loka Radio Mambí. Malgraŭ la streboj, ni konsideras tiun informadon nesufiĉa.

Inter la rekontiĝoj kiujn ni okazigis aŭ partoprenis ni menciu jenajn: Tago de Sankta Valenteno (Tago de la Amo); 6-a TAKE, du kolektivaj naskiĝfestoj, Seminario pri Aktivula Trejnado (septembre), Zamenhof-Metiejo en Baracoa, Guantánamo; ĉeesto en la provincaj ĝeneralaj kunvenoj de MINCUL en teatro Heredia kaj Tago de la Patrino.

Kontrolo de MINJUS estis anoncita por marto, sed ne povis okazi pro malĉeesto de la sekretrario. La tiurilataj dokumentoj estis ankaŭ ĉe li, pro tio, la fina kontrolo okazinta la 27-an de septembro lasis naŭ admonojn el kiuj du estas disciplinaj.

La 26-an de novembro oni okazigis laŭstatutajn elektojn en la PF. Konsulte kun la NE oni decidis fermi la Municipan Filion Santiago de Cuba. Nun oni atendas la oficialiĝon flanke de MINJUS.

Dum 2004 la filio havis 105 membrojn.

Inter la rezultoj menciendas la bonaj rilatoj kun la Direkcio de Asocioj de MINJUS, kun la reprezentanto de MINCUL kaj kun la NE de KEA; nia prezidanto Gonzalo Collantes García reprezentis la kuban esperantistaron en la 38-a Brazila Kongreso de Esperanto.

**PF Granma**

La PE kaj la Komitato por la Disvolvo de Esperanto kunsidis laŭplane kaj funkciis tre bone kaj efike. La membraro en municipo Bayamo kreskis, sed la laboro de la estraro estis nekontiga, pro tio oni okazigis kunvenon kaj elektis novan.

En municipo Río Cauto la estraro laboris neserioze kaj pro tio oni decidis atenti la tieajn membrojn rekte el la PF. La municipa grupo en Jiguaní ne tre entuziasmis kaj pro tio la membraro malkreskis. Ni komencis labori en municipo Manzanillo kaj jam estiĝas grupeto kiu lernas per la koresponda kurso. La sidejo de la PF en Bayamo bezonas diversajn riparojn por bone funkcii.

PF Granma havis 119 membrojn dum 2004. Kvankam estas kresko ni devas ankoraŭ intense labori.

La koresponda kurso, nia ĉefa kaj valorega ilo bezonas plibonigon. Ni petas al la NE atenton pri tio.

Nia konstanta rubriko ĉe la provinca radiostacio Radio Bayamo funkcias tre bone kaj pere de ĝi ni informas pri nia agado kaj la celoj de Esperanto. Pere de tiu rubriko la lernantoj de la koresponda kurso interŝanĝas kun ni, oni klarigas dubojn, esprimas siajn opiniojn, tiel la publiko informiĝas pri la lingvo kaj la asocio. Por informi pri E ni utiligas ankaŭ kontaktojn personajn, telefonajn kaj grafikajn varbilojn.

**PF Holguín**

La filio okazigis sian asembleon kun 22 ĉeestantaj membroj. La PF estis invitita partopreni lokajn kulturajn kaj politikajn eventojn kaj mem organizis aliajn.

Oni informis pri E per loka radio- kaj televidstacio. Oni profitis ĉiun eblan okazon por teni la komunumon informita pri E.

La situacio de E-instruado estas malbona. Ni ne sukcesas kreski malgraŭ la varbado. La infana komunuma projekto "Bona Amiko" daŭre faras sian socikulturan laboron utiligante tiucele la samnoman parkon.

MF Gibara krizas. Ne ekzistas estraro preta antaŭenigi la laboron tie. Komence de la jaro okazos kunsido kun la tiea nura respondeculo kaj reprezentantoj de MINJUS kaj MINCUL por definitivigi la situacion.

La PFhavas tridek membrojn.

**PF Camagüey**

Ĉi-jare PF Camagüey estis dufoje inspektita kaj ambaŭkaze la rezultoj estis kontentigaj. Dum 2004 nia PF havis 53 membrojn. La agado de MG Guáimaro daŭre evoluas kaj stabilas dum ĉi-jare oni fondis novan MGon en Florida.

Meze de la jaro oni lanĉis iniciaton por informi pri E. Temas pri la Interreta diskutlisto [esperantocuba@yahoo.com], kiu diskonigas novaĵojn pri la kuba E-movado. En lokaj radiostacioj en Guáimaro kaj Florida oni dediĉas spacojn al E.

Septembre de 2004 komenciĝis nova kurso kiu jam elmontras kontentigan disvolvon. La instruado estas organizita samkiel ĉe la novaj municipaj universitatoj. La bazaj kursoj etendiĝas al Florida kaj Cascorro.

En februaro 2005 komenciĝos nova kurso por trejni niajn esperantistojn. Tio estas kompetenteco de la Katedro pri Supera Esperanto de la filio. Povos partopreni ĉiuj interesitaj diplomiĝintoj de la baza kurso.

Niaj rilatoj kun MINCUL en la provinco estas bonaj kaj ni partoprenis dufoje kunsidojn kun ili.

Inter la ĉefaj aranĝoj organizitaj menciendas Kultura Esperanto-Rendevuo, Renkontiĝo por Apliko de Esperanto en la Komunumo (RAEK) kun subteno de la Municipa Direkcio pri Kulturo en Guáimaro.

La aranĝoj en Guáimaro okazas en la Muzeo, kie i.a. estis montrita ekspozicio pri Historio de la E-movado en Kubo.

Nia filio havas kontaktojn kun pluraj alilandaj organizaĵoj kaj individuoj.

### MG Ciego de Ávila

Dum parto de la jaro ni ne havis instruiston ĉar Noel ne plu volis daŭrigi. Ni entreprenis la kurson solaj: tri en la dua nivelo, kvin en la unua kaj du kiuj nuntempe ne lernas (la pastro de la preĝejo de Ciego de Ávila kaj Lamas, HM de UEA kaj de KEA).

Inter la atingoj ni menciu kontakton kun PF Granma kaj kun katolikaj asocioj en Argentino kaj Brazilo, i.a. kiuj sendis al ni diversajn materialojn por nia biblioteko.

Ni ricevis du vizitojn de la NE. Ambaŭfoje okazis seminario pri diversaj aspektoj de E: lingvo, historio, movado kaj nuntempa situacio en Kubo kaj en la mondo, lastfoje kun partopreno de germana esperantisto kiu vizitis nian urbon.

Por 2005 ni planas kreskigi la membraron. Estas kelkaj interesitoj lerni la lingvon en la kurso kiu komenciĝos februare. Feliĉe inter la interesitoj aliĝi al la MG troviĝas malnova esperantisto el Santo Domingo, kiu tre bone regas la lingvon kaj pretas instrui. Nia grupo daŭre havas 10 membrojn.

### PF Sancti Spíritus

Ne ekzistas rilatoj kun MINCUL. Dum la kontrolvizito de MINJUS montriĝis, ke tiuj ne plenumas sian laboron laŭ la Rilatkontrakto.

Malgraŭ perioda, kelktaga varbado ĉefe radia, la interesiĝo estis nula. Niaj rilatoj kun la provinca radiostacio estas bonaj.

La retpaĝaro de la Asocio, kiu havis pli ol milo da vizitoj en la jaro fariĝis vera pordo al la mondo. Nur Camagüey kaj Guantánamo sendis raportojn por daŭre aktualigi la retpaĝaron.

Nia membraro ne kreskis. Venontjare ni klopodos fari demarŝojn en Kulturdomoj kaj bibliotekoj por prezenti E-on tie kaj varbi interesitojn.

### PF Ciudad de La Habana

Dum la unua semestro la laboro estis intensa kaj stabila pro la preparlaboroj por la 6-a TAKE. La PF organizis 28 diversajn aranĝojn. Ili estis ĉefe sabataj, sed ankaŭ temis pri kursoj, prelegoj, ktp. La filio respondecis pri la gastigo de aliprovincaj kongresanoj dum la 6-a TAKE.

La kursoj en la provinco ne finiĝas pro diversaj kialoj. La lernantoj ŝajne perdas la intereson. Oni varbis diversmaniere en Diez de Octubre, Plaza kaj Centro Habana, sed la rezulto estis preskaŭ sama.

Kulturo estis laborkampo kun sukcesoj dum la pasinta jaro. Dank' al kontaktoj kun la Arta Lernejo Paulita Concepción, Kultur-

domoj en La Habana Vieja kaj Diez de Octubre, oni sukcesis diversigi la artan enhavon de niaj aranĝoj, inkluzive tiujn organizitaj dum la 6-a TAKE.

Manuel Rodríguez Rábago, nacia komisiito pri KEATUR, membro de nia filio, partoprenis la 1-an Kongreson E kaj Turismo en Pollando. Ankaŭ kelkaj el niaj membroj partoprenis la Zamenhofan Metiejon pasintdecembre en Baracoa.

Organizaj malfacilaĵoj ekzistis dum la tuta jaro en MF Centro Habana, kiu sendis nek monon nek liston de la membroj pagintaj sian kotizon ĉi-jare. Diversaj inspektoj de la NE deklaris malbona la laboron de tiu filio.

La PF estis inspektita de MINJUS kaj de la NE. Ambaŭkaze la rezulto estis kontentiga kaj la plibonigendaj aferoj estis tuj entreprenitaj.

**Konkludoj**

Ni alfrontu la estontecon kun optimismo malgraŭ multaj obstakloj kiuj certe aperos survoje. Ni konsciu ke la lando travivas, samkiel nia tuta terglobo, malfacilan periodon kaj por multaj homoj Esperanto devus ĉiam reprezenti alternativon de espero, do, ni devos eltrovi elirvojon kaj solvojn praktikajn al la pluraj problemoj de la ĉiutaga vivo kun nia plej alta celo disvastigi Esperanton kaj plifortigi nian movadon.

Do, nia defio estas lanĉita! Ni esprimu nian pretecon kunlabori per faktoj. Kion ni devas fari? Estas bona momento por starigi al ni tian demandon. Kiel ni individue kontribuos al la saneco de nia movado, al la sukceso de niaj planoj?

La historio de Esperanto tutmonde estis plena je fortaj pasioj kaj obstinemo, skismoj, eĉ krizoj, sed ni vidu ĝin kiel etapoj, do, ni ankaŭ laboru pasie kaj obstine cele al plej altaj celoj: paŝi antaŭen.

La 5-a Kongreso de KEA estas nia plej tuja tasko kaj ni fidas je vi por tiu tasko, je vi, esperantistoj ni kalkulas por tiu projekto.

Kiel iam esprimis fama esperantisto, s-ro Claude Piron, Esperanto estas bona ĉar ĝi naskiĝis el sento de kompato, de solidareco, de postulo al justeco kaj homa digneco. Kaj tial ĝi supervivos la aliajn. Sed bedaŭrinde multfoje ni, esperantistoj, ne estas plene konsciaj pri tio.

Kiam ni estu plene konsciaj pri la boneco de Esperanto, ĝi povos helpi en la solvo de multaj problemoj ligitaj al manko de interkomprenilo. Kaj ĝi estas interkomprenilo efika. Do, ni ne rajtas ĝin perdi nek perfidi.

Pro tio hodiaŭ, kiam nia landa asocio proksimiĝas al dudeksesjariĝo, mi invitas ĉiujn labori samcele.

Defioj staras, ni agu persiste kaj kunlaboreme por la sano kaj longa vivo de KEA.

Dankon!

**5-a Kongreso Kuba Esperanto-Asocio**

Muzeo de Historio de la Sciencoj Carlos J. Finlay
La Habana Vieja

Havano, 2005.03.03-06.

Kongresa temo:
"Esperanto:
realo kaj estonteco"

## ĈEFAJ GVIDILINIOJ DE KEA POR LA PERIODO 2005-2007

### 1. INFORMADO KAJ ELDONA-AGADO

1.1. Ekstera informado pri E, la internacia E-movado kaj KEA, per la tradiciaj amaskomunikiloj.

1.2. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Por pli vasta komunumo* por varbi kaj grandigi la membraron de KEA.

1.3. Utiligi ĝisdatigitajn informilojn de UEA kaj produkti proprajn pri E kaj ĝia movado por internacia kaj landnivela uzoj, kaj zorgi pri ilia distribuado.

1.4. Produkti kaj eldoni la oficialan organon *Avanco* kaj la E-informilon de la NE.

1.5. Atenti kaj proponi eldonan planon kongrue kun difinendaj prioritatoj de la Asocio.

1.6. Kunlabori aktive por starigi kaj regule aktualigi la esperantan paĝon de RHK, tiel ke ĝi provizu informojn pri E kaj KEA. Atenti la jam ekzistantan kaj stimuli la kreadon de aliaj hejmpaĝoj tra la tuta lando.

### 2. DISVASTIGO

2.1. Daŭre labori por aktivigi la movadon en Cienfuegos, Matanzas, Villa Clara, Havano, Pinar del Río, Las Tunas kaj Junulara Insulo.

2.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Sancti Spíritus, Ciego de Ávila, Holguín, Camagüey, Urbo Havano, Santiago de Cuba, Guantánamo kaj Granma.

### 3. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

3.1. Membro-kontrolo kaj kotizo unufoje jare.

3.2. Atento kaj kontrolvizitoj al filioj.

3.3. Sendado de KEA-informiloj al Membroj-Subtenantoj.

3.4. Flegi la informan fluon al la Komitato.

3.5. Flegi la organizan kaj internan administradon de la Nacia Sidejo de KEA.

3.6. Revigligi la kategoriigon de membroj kaj utiligi ĝin kiel kondiĉo por decidi pri partoprenontoj en eventoj.

### 4. FINANCOJ

4.1. Kontroli la plenumon de la buĝetoj de KEA en CUP kaj CUC.

4.2. Atenti kaj kontroli la filiojn kun emfazo en la konscio pri memfinancado kaj travideblo en ĉiuj niveloj.

4.3. Kontroli la Libroservon kaj labori por kreskigi ĝian stokon.

### 5. INSTRUADO

5.1. Flegi la okazigon de diverstipaj kursoj tutlande kaj kontroli ties kvaliton metodologie kaj lingve. Garantii la bazajn lernomaterialojn.

5.2. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Por pli vasta komunumo* por varbi interesitojn kaj kreskigi la kvanton da lernantoj en la diversaj kursoj, speciale en la PKK.

5.3. Flegi la instruan rolon de la oficiala organo de KEA.

5.4. Kontroli kaj atenti la instruistaron (ILEI-Sekcio) metodologie kaj lingve.

5.5. Flegi la rilatojn kun ILEI kaj laŭeble partopreni ties edukajn projektojn.

### 6. PUBLIKAJ RILATOJ

6.1. Daŭre flegi la rilatojn kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo.

6.2. Plifortigi la rilatojn kun la rilatorgano. Flegi la korektan plenumon de la rilatkontrakto.

6.3. Plifortigi la rilatojn kun UN-Asocio kaj UNESCO-Komisiono per konkretaj planoj aŭ projektoj (Karibio kaj KEA), kaj Asocio de Lingvistoj.

## 7. INTERNACIAJ RILATOJ

7.1. Daŭre flegi la kontaktojn kun UEA, landaj asocioj (aparte kun la Amerikaj), Internacia E-Instituto kaj kluboj.

7.2. Plifortigi la solidarajn rilatojn kun landaj asocioj, kluboj kaj amikaj organizaĵoj. Aparte flegi la rilatojn kun FEL kaj La Amikoj de Kubo.

## 8. KULTURO

8.1. Kontroli kaj atenti la kulturajn programojn de la asociaj aranĝoj kaj eventoj. Flegi la reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj.

8.2. Stimuli la partoprenon en eksterasociaj eventoj kulturaj kaj klerigaj.

8.3. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Savi esperantaĵojn* kun la celo prizorgi kaj savi historie valorajn esperantaĵojn en niaj bibliotekoj. Atenti pri la korekta utiligo de la bibliotekoj tutlande.

8.4. Stimuli la filiojn okazigi lokajn kaj regionajn kulturklerigajn aranĝojn.

8.5. Kontroli kaj atenti la kulturan programon de la 5-a Kongreso de KEA

8.6. Aktive partopreni la kulturklerigan vivon de la komunumo per konkretaj programoj / eventoj.

## 9. UTILIGO DE ESPERANTO

9.1 Starigi aŭ plifirmigi kontaktojn kun internaciaj organizaĵoj pri medicino, turismo kaj aliaj, laŭ la prioritatoj.

9.2 Daŭre informi kaj stimuli la membraron pri utiligo de E en scienco kaj tekniko. Atenti la okazigon de fakaj renkontiĝoj.

9.3 Atenti informpetojn de interesitoj viziti Kubon. Publikigi turismajn informojn pri Kubo.

9.4 Instigi partoprenon de la Asocio en eventoj de fakaj institucioj per konkretaj programeroj.

9.5 Prepari lokajn esperantistojn ekde informa kaj lingva vidpunktoj por atenti alilandajn vizitantojn.

9.6 Prizorgi la turisman programon de la 5-a Kongreso de KEA.

**Rimarko**:
La Cefaj Taskoj de KEA daŭre estas la gvidlinioj de la Asocio kaj enhavas difinitajn aspektojn celantajn la plenumon de la jara laborplano de ĉiu estrarano. Ili entute kongruas kun la celoj de la Strategia Laborplano de UEA por la periodo 2001-2010.

## Enlandaj eventoj

1. 22-a Komitatkunsido
   Urbo Havano, 2005.01.14-15.
2. 5-a Kongreso de KEA
   Urbo Havano, 2005.03.03-06.
3. 26-a Datreveno de KEA
   Tutlande, 2005.06.16
4. Seminario pri Aktivula Trejnado
   Camagüey, 2005.04.
5. Seminario pri Aktivula Trejnado
   Urbo Havano, 2005.05.
6. Seminario pri Aktivula Trejnado
   Santiago de Cuba, 2005.06.
7. Kultura Infanfestivalo
   Guantánamo, 2005.07.15-18.
8. Seminario pri Aktivula Trejnado
   Sancti Spíritus, 2005.10.
9. Seminario pri Aktivula Trejnado
   Granma, 2005.11.
10. Tutlanda Metiejo Zamenhof-Tago
    Guantánamo, 2005.12.15-19.

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO
N-ro 1/2005; aperas 4-foje jare
Eldonas: Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120, 10500 Havano, Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484; 53 9102
Fakso: 649 8729
Retadreso: kubesp@enet.cu
Ĉefredaktoro: ALBERTO GARCÍA FUMERO;
Lingve kontrolas: MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ;
Enpaĝigo: ALBERTO FERNÁNDEZ-CALIENES BARRIOS

**Kurso de Esperanto**
**Por aŭtodidaktoj**
**En Interreto**

**www.monda.org/nesto/nesto-es.htm**



auanco

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484; 53 9102 Fakso: 649 8729
kubesp@enet.cu


Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro